
# Sonorilo

64-a jaro, n-ro 1

januaro-februaro 1972

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO: Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO: Balleux René, Oude Donklaan 83, 2100 Deurne

Belga Esperanto-Federacio

ASOCIO SEN PROFITA CELO — SIDEJO
Sint Bernardse Steenweg 1078, Hoboken. Tel. (03) 276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice (†)

HONORA PREZIDANTO
D-ro Kempeneers Paul

HONORA VICPREZIDANTO
Sielens Henri

FEDERACIA PREZIDANTO
D-ro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin, Liège

VICPREZIDANTOJ
Jacobs R. – Poupey Ch.

ĜENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, St. Bernardse Steenweg 1078, 2710 Hoboken

FEDERACIA KASISTO
Balleux René, Oude Donklaan 83, Deurne

POŜTKONTO DE B.E.F.: 1634 34 OUDE DONKLAAN 83, 2100 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
F-ino Orsolini A., rue P. Pastur 6, 6000 Charleroi. P.K. 2016 40

# INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO

**ANTVERPENO (BELGUJO) (28)29-4 ĝis 1-5, 1972**

(54-a Belga E-o Kongreso, 10-a Markola Kongreso, Trilanda Renkontiĝo)
Sub aŭspicioj de la Belga Ministerio pri Nederlanda Kulturo kaj de la Ligo de Flandraj Kulturorganizaĵoj

Sekretario: J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenweg 1078, B-2710 Hoboken-Belgujo.

Kasisto: H. Boljau, Pastorijstraat 45, B-2000 Antwerpen; p.ĉ. 10039.95.
Telefono: (03) 40.07.76.

## PROVIZORA PROGRAMO

Jam 250 aliĝintoj: ne plu prokrastu se vi volas havi loĝejon en la ĉirkaŭaĵo de la kongresejo.

| | | |
|---|---|---|
| Vendredon, 28/4: | 20a h. | Bonvenigo de la jam alvenintaj kongresanoj fare de la Reĝa Antverpena Grupo Esperantista "La Verda Stelo" en la kongresejo "Bouwcentrum". – Intima Festvespero okaze de la 65-jara ekzistado de la "Verda Stelo". Inaŭguro de poŝtmarkekspozicio. |
| Sabaton, 29/4: | 10a horo: | giĉetoj malfermitaj<br>Ekspozicio vizitebla / Librobudo malfermita |
| | 11a horo: | Kunveno de LKK (nepublika) |
| | 11,30a | Esperanto programita, gvidota de P.Peeraerts |
| | 16a | Oficiala Malfermo: - Enkonduko, muziko<br>- Salutoj de landaj reprezentantoj oficialaj<br>- Salutoj de landaj kaj fakaj asocioj<br>- Muziko<br>- Festparolado (Jo Haazen) |
| | 17,45a | Komuna vespermanĝo |
| | 20a | Kongresa balo. |
| Dimanĉon, 30/4: | 10a horo: | Akcepto en la urbodomo / Vizito al la urbo. |
| | 11,30a | Eŭkumena meso |
| | 13a | Komuna tagmanĝo |
| | 14,30a | Prelego de Prof.G.Waringhien, Prez. de la Akademio, pri "Lingvo kaj stilo de Zamenhof" |

| | | |
|---|---|---|
| | 15,30a | Kunvenoj de diversaj landaj asocioj / Kunveno de ILEI. |
| | 16,30a | Publika debato enkondukota kaj gvidota de D-ro John Wells pri "Kiamaniere ni, esperantistoj, povas helpi al sociaj kaj lingvaj malplimultoj" |
| | 18a | Komuna vespermanĝo |
| | 20,30a | Artvespero |
| Lundon, 1/5: | 9a | Kunveno de ILEI |
| | 10a | Prelego fare de Drs. E.Frederickx. |
| | 11a | Fermo de la Kongreso kaj rezolucio |
| | 12,30a | Komuna tagmanĝo |
| | | Postaj aranĝoj: |
| | 15a | Kunveno de ILEI |
| | 15,30a | Vizito al la muzeo Plantin Moretus: komentarioj en Esperanto. |
| | 17a | Kunveno de la LKK. |

# JARKUNVENO de BEF

SABATO, 11.3.72

Hotelo Excelsior, strato de la progreso 7, Bruselo
ek de la 15-a horo.

- Aprobo de la ĝenerala raporto fare de S-ro Verstraeten
- aprobo de la bilanco
- 54-a Belga Esperanto-kongreso en Antverpeno
- Esperanto-tago en Bruĝo
- Sonorilo — Esperantopanoramo — l'Espéranto en marche
- Fondaĵo Jaumotte-Loquet
- Diversaĵoj

La administrantaro kunsidos ek de la 14a 15, en la sama ejo.



# Trilanda Renkontiĝo

La 19an de septembro 1971a okazis la aŭtuna trilanda renkontiĝo en Maastricht. Je la 10a la prezidanto, s-ro H.Peters bonvenigis 58 partoprenantojn, speciale la eksterregionajn gastojn kaj tre speciale s-rojn Tosiaka Sasana el Japanujo kaj Aleksander Chonczyk, kiu loĝas en la naskiĝstrato de D-ro Zamenhof en Bialistoko.

La kunveno decidis aranĝi la printempan renkontiĝon 1972a en Antverpeno kun la 54-a Belga Esperanto-Kongreso kaj la 10a Markola Kongreso. Tiel ĝi estos "Internacia Esperanto-Kongreso", kiu okazos de 29-4 ĝis 1-5. (Sekretario S-ro J.Verstraeten, ST. Bernhardsesteenweg 1078, B 2710 Hoboken, Belgujo).

Post la laborkunsido la partoprenantoj faris promenadon tra la urbo. Samtempe okazis preskonferenco; unu jurnalisto ĉeestis, kiu informiĝis pri la instruado kaj agado en Eŭropa kadro. La vizito al la urbdomo, kie oni estis akceptata tre agrable, estis tre interesa. La konstruaĵo enhavas trezorojn de murtapiŝoj kaj pentraĵoj; ĝi mem estas monumento pri la urba historio.

La komunan tagmanĝon oni ilustris per muziko kaj kelkaj skeĉoj. La menuoj, mandesegnitaj de lernantinoj de mastruma lernejo, vekis plenan admiron de ĉiuj. Posta boatekskurso sur Mozo donis impresojn pri la industria evoluo ekster la urbo. La sunplena tago finiĝis per Diservo en la kapelo de la baziliko Sankta Servaco kie Pastro Wannemakers celebris.

Kiel ekster-regiona gasto mi tre ĝuis tiun tagon.

O.Hoekstra




RABATO POR ESPERANTISTOJ

## NEKROLOGO

**Fraŭlino TERRYN Juliette forpasis la 16.1.1972, 76 jara.**

Ni ne plu vidos ŝin, kun la ĉiamaj pakaĵoj de dokumentoj pri financoj, ĉu de FL.L.E., ĉu de B.E.F.......

Ni ne plu povos helpi ŝin, por supreniri en la vagonaron, tiom da fojoj, kiam ŝi reiris hejmen post kunveno en Bruselo....

Ŝi ne plu akompanos nin al tiom da internaciaj kongresoj, Parizo, Varsovio, Londono, Kopenhago, Sofia, Marseille, Bruselo, Harrogate, Bournemouth,.......

Ŝi ne plu grumblos kiam la grupoj malzorgeme tro malfrue pagas la kotizojn.......

Sed kelkaj inter ni iris al ŝi por la lasta fojo: F-ino Begodt, S-roj Vandevelde, Mortelmans, Lödör kaj aliaj el Gent; S-ro Paulus de Charleroi; S-ino Meurrens de Leuven kaj S-ino De Hondt kaj S-ro Verstraeten J. el Antverpeno.

Ŝi estis certa, ke ankaŭ nia Prezidanto, S-ro Debrouwere, ĉeestus tiun lastan momenton; kaj el liaj vortoj ĉe la entombigo vi kun ni legu:

"Kara Juliette, dum tre longa periodo ni kune laboris por diskonigi Esperanton. Via firma konvinko estis, ke nur komuna helplingvo eblus reatingi, ke la mondo retrovu la pacon kaj ke la devizo — neniam plu milito — fine realiĝu. Via idealo estas ankaŭ la nia, kaj ni solene promesas daŭre agi ĝis fina venko. Vian karan memoron ni fidele gardos".

Tiuj vortoj kvazaŭ el nia koro venis.......

## LOVENA ESPERANTO-GRUPO
**Naamsestraat 78**

La 9an de novembro 1971 organizis LOVENA ESPERANTO-ASOCIO sub nomo de BEF, konferenc-debaton pri Esperanto por francparolantaj Universitataj studentoj, je invito de C.I.E.E. (Cercle International Etudiants Etrangers), kies respondeculo estas Sinjoro Claude Habarushaka, Delegito por Kulturaj Aferoj.

Doktoro Pol Denoël de Liège, ĝenerala prezidanto de BEF estis anoncita kiel parolanto.



Afiŝoj kaj cirkuleroj estis volonte disportitaj de fremdaj studentoj en la studentkvartalo "Vesale".

Je la 20,30 h. D-ro P.Denoël sur la podio de la granda aŭditorio estis prezentata de s-ro J.De Saeijtijd, instruisto de la Lovena Ateneo, kiu ĉijare gvidis E-kurson en tiu lernejo. Antaŭ negrandnombra publiko, konsistanta plejgrandparte el diversnaciaj studentoj universitataj, D-ro P.Denoël lerte kaj per trafaj argumentoj sciis kapti la atenton de la aŭdantaro kaj respondi amplekse al ĉiuj demandoj. Gesinjoroj G.C.Fighiera-Sikorska de Heroldo de Esperanto venis de Bruselo por ĉeesti tiun Konferencon kaj elkaptis okazojn por apogi la asertojn de la parolanto.

Preferoj al la angla lingvo neniel manifestiĝis.

Post kiam la Ĝenerala Prezidanto de BEF jam estis for por trafi kun la edzino la trajnon al Liège, tri studentoj: Boliviano, Italo kaj Ruandano subskribis la kursenskribilon.

La kurson ekgvidos S-ano Ferenc Mozŝi, hungaro, diplomito de la Budapeŝta Universitato por Esperanto. Li mem, de du monatoj alveninta en Belgujon, ekstudas nun ĉe la Lovena Universitato. La rezulto de la klopodoj de L.E.A. en la universitata medio de sia urbo ne estas ankoraŭ signifa, sed unua paŝo estas farita.

## REĜA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

Hotelo "Excelsior", 7, strato de la Progreso, 1000 Bruselo

PROGRAMO:

| | |
|---|---|
| 15/3/72: | EKI VESPERO, merkrede, ĉe Sat-Amikaro: Sinjorino Maggi VAN AELST prelegos pri "Parolado kaj Aŭdado". |
| 20/3/72: | Perfektiga Kurso, fare de S-ro van der STEMPEL. |

**NI GRATULAS** Sinjoron Fernand MATHIEUX okaze de lia DIAMANTA JUBILEO kaj dankas lin kore pro liaj 60 jaroj da fideleco!

## Esperanto-Grupo EUPEN

Ni bonvenigas novan grupon en la sino de B.E.F., la Esperanto-grupo de EUPEN, kies prezidantino estas S-ino VERTONGEN, rue de Verviers 101, Eupen.



**TEKSTOJN por la numero 'marto-aprilo', tuj ensendu, ni petas! (plejlaste la 20.3.72).**

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** Pvba.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

P. V. B. A. **FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN**

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

**Telefono 272875**